

Subtera Trajno de Moskvo.

D-ro Isamu Yamaga

Estis frumatene la 7-a horo de la 28-a julio, 1983, ĉe la enirejo de subtera trajno de Moskvo. Tie mi staris kun s-ro O. Eguti, Otaru, mia akompananto.

Amaso da laboristoj jam kolektiĝis kaj ili acetis tagjurnalojn au cigaredojn laŭvole. La kosto de la bileto estis malkara. Oni eniris la eskalatoron laŭ-vice. La klinaleco estas tute kruta kaj ĝi kuras tre rapide ĝis la fundo de pli ol 100 metrojn longa. Preter nia vico maldekstre kelkaj gejunuloj rapide piedkuradas malsupren same kiel simio. Estis mirinda kaj surprizita sceno.

Tamen la fundo estas sufiĉe vasta, la tegmento estas alta kaj la iluminataj lampoj estas pendataj sub la tegmento. Sur la muro oni trovas pentraĵojn kaj skulptaĵojn. Sajnas al mi, ke ĝi estas tute bona promena vojo kaj ripozejo.

Baldaŭ la trajno venis kaj oni en-vagonaris. Oni ne malpermesas fotadon de homojn kaj ec soldatoj en la vagono. Tamen mi pensis, ke ĝi fariĝos kasejo en la milito kontraŭ atombomboj en tia 100-metra profunda subtero, ĉu ne?

Kvankam eĉ se la rekta atako de kerna bombo estus defendita, la tero estos terure atakata kaj ĉiuj vivagoj mortos momente. Cio estas vana!

Denove Ne! La Atombombo!

Ne permesita la kerna bombo!!

ザメンホフ祭ご案内

今年のザメンホフ祭は12月6日(土)15時から北海道クリスチャンセンター(北区北7西6)2階大ホールで! 一詳細は次号にて—

第50回道エス大会開く

9月6日(土)7日(日)両日にわたり、札幌クリスチャンセンターにて開催された。

北京世界大会後の第50回記念大会ということで来賓として中国の駐札幌副総領事李楓氏及び磯部幸子J E I理事長が出席され、室蘭から久方ぶりに須藤昭二氏、函館からはエスペラントでハムの交信にはげんでいる岩井正久氏が初参加された。

大会参加者は51名(うち不在参加者7名)、公開記念講演には65名が聴講された。

第1日目15時受付開始、ビデオコーナー、北京大会、山部合宿のスナップ写真等が展示され会場を賑わせた。20時からの前夜祭は佐々木将人氏司会で、初参加の受講生による合唱、rondo pupilojによる2幕の寸劇、北京大会で習ってきた歌の参加者全員による輪唱、有志各氏による弁論大会等、楽しい一時であった。尚同じセンターで22名が宿泊したが講演者のラグナル氏を囲み、多数の方々による夜おそくまでの交歓が続いた。

第2日目は、9時から坂下正幸氏司会により大会がはじまり、星田淳、切替英雄議長団のもとに活動報告、議案審議の後、スライドでの北京大会報告、有志4名のエスペラントによる講演が大会を盛りあげた。記念撮影の後、昼食をとり13時からの3講師による記念講演会は熱心な参加者に対し非常に感銘をあたえた。

大会の開催中、J E Iからのエスペラント図書 の委託販売は売上高6万2千円と好評だった。

NHKラジオ第一放送で 三沢教授『話題』に出演

9月5日7:40~55に出演“エスペラントが発表されてから来年で100年になり、日本では80年になる。北海道でのエスペラントは50数年の歴史があり、今年は50周年の大会が札幌で行われる。北京では今年第71回世界大会が開催され北海道からも沢山参加したが、中国では学習者が40万人もいる。エスペラントは学びやすく、世界の友好と平和に役立つ言葉である。”と。

第50回

北海道ESP大会記録

☆とき 1986年9月6日(土)～9月7日

☆ところ 北海道クリスチャンセンター
2階大ホール

☆第1日(9月6日)

15.00～受付開始

ビデオの放映(銀河鉄道)

写真展示(山部合宿、北京)

第2回HEL役員会 於、3Fホレンコ

17.30～20.00

Bankedo, antaū - festo

前夜祭

☆弁論大会

- 岩井正久 日本大会初参加の印象
- 宮沢直人 核実験に反対しよう
- 河原一弥 ESPの理想と精神
- 切替英雄 ESPを実用化しよう
- 渡辺康子 詩の朗読
- 坂下正幸 世界大会に参加して
- 須藤昭二 国鉄の現状について

☆新会員及びロンドの紹介

☆歌の合唱、寸劇、北京大会参加者の指導による出席者全員による輪唱

☆第2日(9月7日)

大会

8.30～受付開始

9.00 坂下正幸司会により

大会宣言 F-ino Beverly G. Layton

合唱 Espero ピアノ伴奏 栗原千鶴子

大会実行委員長挨拶 吉原正八郎

議長団選出 星田淳 切替英雄

議長挨拶 星田淳

HEL会長挨拶 三沢正博

来賓挨拶

JEI理事長 磯部幸子

ESP100周年の事業計画について

ラグナール パルドールソン

アイランドは北方圏に位置し北海道より寒いが木も花もよく似ている。

9.25～ HEL事務局長 宮岸忠孝による

☆①HEL活動報告

1. 役員改選により事務分担と引継を行う
2. 役員会を2回開催する
3. 機関紙(Heroldo de HEL)を3回発行す
4. 71a UK(北京)にHELより15名参加
5. 事務局が札幌にあるのでSESに協力
6. 北海道エスペラント運動史発刊に協力

☆②HEL会計報告 別紙添付

☆各地区報告

札幌 (宮岸忠孝報告)

‘85年12月14日ザメンホフ祭をクリスチャンセンター5Fで40名参加

‘86年1月～7月 北京大会特別講習会 毎週12名以上参加

5月3日～5日 山部合宿講習19名参加

5月～9月 入門講習会開講、10名受講

小樽 (江口音吉報告)

毎週木曜日勉強会開催

函館 (岩井正久報告)

北海道大会初参加

苫小牧 (星田淳報告)

毎月3回金曜日に苫小牧市民会館で集会 s-inoマックギル来訪交歓

9月に苫小牧文化祭でESP展示会開催

☆活動方針協議

1. 機関紙の発行を隔月とする
2. 初等講習、展示会等を引き続き開催する
3. 北海道観光地図のエス語訳作成の検討
4. HELの文献は札幌大学に委譲する
5. 来年のHEL大会は9月中旬札幌で開催
6. 日本大会招請の件は昨年の大会決定の状態のまま保留

☆決算報告及び予算審議

別紙添付の会計決算報告書の通り承認される

☆役員改選

宮井康夫を新たに加え他は全員留任とする

☆表彰状贈呈

北海道ESP運動史の第1部、第2部を完成させた功績をたたえ相沢治雄氏にHEL会長から表彰状が贈られ、相沢氏から謝辞が述べられた

☆“北海道エスペラント運動を顧みて”の講演

木村喜任治、新田為男、江口音吉、高橋要一の各氏が上記演題につき、当時をしのびながら戦前戦後に及んでいろいろな価値あるエピソードをエス語でかたった

☆北京大会参加者からの報告

スライド映写を加え砂野裕子、藤平あや子兩名から北京大会とekskursoについて、栗原靖、千鶴子夫妻からはハルピン、シエンヤンでの交歓状況について報告があった

☆中華人民共和国 駐札幌総領事館

副総領事 李 楓 氏挨拶

本大会に出席する機会に恵まれたことを感謝し、大会の開催を祝います。

アジアに於いて東京につづき、北京でエスペラントの世界大会が開催されたことは非常に嬉しく思っています。

相互理解、交流の発展を得たと思います。

三沢教授を始め4名の方が中国東北を訪問され、その折に写されたスライドをこの機会に見せていただき重ねて感謝いたします。

何か国かの外国語が分るが、エスペラント語はまったく分らない。昨日、今日と出席して少し理解出来たように思われます。

以前にソ連、モンゴル、ブルガリア等で大使館勤務をしたが学ぶチャンスがなかった。歳をとったが今後機会があれば是非学びたい。

第50回北海道エスペラント大会を祝して挨拶にかえます。

13:00~15:00

公開記念講演会

司会 児玉広夫

1. 磯部幸子 JEI理事長
『ESP100周年にむけて』
2. ラグナール バルドールソン氏
アイスランド出身 北京大学を経て現在
東京大学哲学科大学院生兼報道特派員
『国際語としてのエスペラントの将来』
通訳 磯部幸子女史
(内容 別掲)

3. 三沢正博 北海道教育大学教授

『日中にかかる緑の銀河』

“エスペラントが日本で軍国主義に圧迫されていた時、中国ではエスペラントを使って中国の救済を計っていた。

日本軍国主義により追放されたエスペランチスト盲目の詩人エロシェンコと長谷川テルの二つの星は小さいが、現在、銀河と呼んで相応しい大きな流れとなって輝き初めている。

今や中国でのエスペラント学習者は40万人以上といわれる。”

感想文

『第50回道大会』

に参加して

田代 茂己

初級講座でエスペラントの勉強を始めて、およそ3ヶ月。期待と不安で迎えた全道大会だ。前夜祭で、私たち10人の講習生は、自己紹介と歌の披露をした。全員揃う事が少なく、練習は十分でなかったが、『私たちはコメンツァントなのだから、下手で当たり前。大きな声で、元気良く歌えば良いんですよ!』などと仲間を元気付け、何とか本番に臨んだ。出来の良し悪しはともかく、楽しく私達のパートを終える事ができた。

諸先輩のスピーチや朗読には圧倒されっぱなしだった。もう少し勉強していれば、もっと良く内容が理解出来たと思うと、残念でならない。

間もなく、La Teksto Unua を終了する。今まで、上手くしゃべれない事に対して、『まだ、習いたてなので……』をくり返して来たが、これからは、もう通用しない。実際、今でも、一般の人達からは、初学者だろうと上級者だろうと、一緒に『エスペランチスト』として見られる。道大会当日も、『外国の方から何か質問されたら、どうしようかな?』などと心配で仕方がなかった。

勉強は、小林先生を中心に、これからも続ける事を全員一致で決めた。毎日、一言でも多くエスペラントで話そうと思う。先輩諸氏、

“Kiel vi fartas?” “Kio estas tio?”

何でも良いから、どんどん話しかける。うるさくならず、相手をして下さる様お願いしたい!

La Futuro de Esperanto

pormemora publika prelego
ĉe la 50-a Kongreso
de Esperantistoj en Hokkaido

Ragnar BALDURSSON
Tokio Universitato

Sapporo
1986, 9, 6.

(El la redaktistaro:

La prelego de s-ano R. BALDURSSON, islanda studento pri ĉina filozofio, daŭris 30 minutojn. Ĉi tiu teksto estas la tuto de la prelego, kies aperon en nia Heroldo li bonkore permesis, k por tio li donis al ni la originalan skribaĵon. S-anino ISOBE Jukiko (ĉef-direktoro de Japana Esperanto-Instituto) faris bonan paroltradukon por niaj novaj esp-istoj k neesp-istaj aŭskultantoj. Pro manko de spaco, la lasta 1/3 parto aperos en la venonta numero.)

Estimataj gesamideanoj k aliaj ĉeestantoj. La temo de mia prelego estas la futuro de Esp-o. Unue mi tamen volas iom paroli pri la nuna situacio de Esp-o k la lingva situacio de la mondo ĝenerale.

Venontjare estos la centjara jubilea jaro de Esp-o. Tiam estos cent jaroj de la eldono de la unua esp-a lernolibro, kiun verkis la pola kuracisto L.L. Zamenhof, la aŭtoro de Esp-o. Lia celo estis doni al la homaro unu komunan internacian lingvon por faciligi interkomprenon inter homoj de diversaj nacioj. Li parte sukcesis ĉar la lingvo kiun li faris, Esp-o, jam montriĝis esti tre taŭga ilo de internacia komunikado. Ĝi estas tre facile lernebla k samtempe ĝi estas tre riĉa de esprimoj k oni laŭbezone povas fari novajn vortojn por esprimi novajn konceptojn el diversaj kulturoj k laŭ la bezonoj de sociaj k sciencaj ŝanĝoj.

Esp-o tamen ne disvastiĝis tiel rapide kiel Zamenhof k la unuaj esp-istoj esperis. Oni kalkulas ke maksimume kelkaj milionoj da homoj nunvivantaj iom lernis Esp-on k certe malpli ol unu miliono kapablas paroli Esp-on suface lerte. Kompare al la grandaj naciaj lingvoj kiel

la ĉina, la angla, la rusa, la hispana aŭ la japana malpli ol unu miliono da parolantoj de Esp-o estas iom malmulte se ni konsideras ke esp-istoj celas fari Esp-on la duan lingvon por ĉiuj en la mondo. Sed kompare al multaj lingvoj de malgrandaj popoloj, kiel ekzemple mia lingvo, la islanda kiun malpli ol 250,000 homoj parolas, parolantoj de Esp-o tute ne estas tre malmultaj.

Kaj kvankam Esp-o ne disvastiĝis suface multe por ke oni povas libere uzi ĝin en flughavenoj, hoteloj, butikoj aŭ sur strato parolante kun nekonatoj, Esp-o tamen estas la sola vivanta internacia lingvo kiu ekzistas en la mondo. Esp-o estas la sola lingvo kies parolantoj ne estas iu nacia aŭ loka grupo de homoj. La parolantgrupo de Esp-o estas internacia k Esp-o ekzistas nur kiel ilo de internacia komunikado, t.e. kiel komunikadilo inter homoj de malsamaj nacioj kies patraj lingvoj estas malsamaj. Verdire esp-istoj de sama nacio ofte parolas esperante kiam ili renkontiĝas kvankam ili havas komunan patran lingvon. Sed sen internacia komunikado Esp-o ne povus ekzisti. Grandaj naciaj lingvoj kiel la angla aŭ la rusa estas multe uzataj internacie sed ili tamen nur estas internacie uzataj naciaj lingvoj. Esp-o estas la sola vera internacia lingvo.

Kiel iuj de vi eble scias mi uzas la ĉinan lingvon en mia hejmo kiel la komuna lingvo kun mia edzino, ĉar ni konatiĝis en Pekino kie ni ambaŭ estis studentoj, k kvankam ŝi estas japana ni tamen daŭre uzas la ĉinan por interparoli. Ni do uzas la ĉinan internacie. Ĉu la ĉina do fariĝis internacia lingvo pro nia internacia uzado de ĝi? Tute ne, la ĉina daŭre nur estas nacia lingvo kvankam ni uzas ĝin internacie. Ni ripetas: Esp-o estas la sola internacia lingvo.

Kaj Esp-o estas la sola lingvo kiu taŭgas kiel internacia lingvo. Nur pere de Esp-o oni povas havi egalecon en internacia komunikado. Iuj homoj pensas ke la angla lingvo jam estas internacia lingvo ĉar dum la lastaj jardekoj ĝi fariĝis la plej vaste uzata lingvo en internacia komerco k turismo. Sed la angla lingvo fakte ne estas k

ne povas fariĝi vere universale uzata internacia lingvo pro la fakto ke la uzado de la angla alportas malegalecon en internaciaj rilatoj. La angla lingvo estas la nacia lingvo en Britujo, Usono, Aŭstralio k Nov-Zelando. La uzado de la angla lingvo internacie estas favora al la loĝantoj en tiuj landoj, k en grandaj partoj oni tute ne akceptas la uzadon de la angla lingvo en internaciaj rilatoj: En la orienta parto de Eŭropo oni uzas plejparte la rusan lingvon, aŭ foje la germanan lingvon, en rilatoj inter la nacioj kiuj loĝas tie — la loĝantoj de la arabaj landoj preferas uzi la araban lingvon — en Meza- k Suda-Ameriko oni uzas la hispanan k preskaŭ ne la anglan — k en Afriko oni multe uzas la francan aŭ eĉ la germanan en internaciaj rilatoj, por menciigi kelkajn ekzemplojn.

Oni ne povas antaŭvidi ke la kontraŭstaro de homoj en tiu regionoj kontraŭ internacia uzado de la angla lingvo malgrandiĝos. Male pli k pli multaj homoj postulas egalecon en internaciaj rilatoj, ne nur en politika k ekonomia sferoj sed ankaŭ en la kultura k lingva sferoj. La postulo pri lingva egaleco estas eble plej klara en la evoluintaj landoj en Eŭropo. Tio montriĝas i.a. en la Eŭropa Komunumo kie la lingvoj de la membroŝtatoj havas egalan rajton. En la kunvenoj de la Eŭropa Komunumo oni do ĉiam postulas interpretadon inter la koncernaj lingvoj. Oni ne volas perdi egalecon en komunikado per la uzado de unu de la naciaj lingvoj, ekz. la angla, la germana aŭ la franca. La kosto de tia interpretado estas tre alta sed oni konsideras ĝin kiel prezon de egaleco kiun oni vole-nevole devas pagi. Esp-istoj k iuj politikistoj k funkciuloj de la Eŭropa Komunumo rimarkigis ke oni povus akiri tiun lingvan egalecon multe pli malmultekoste k simple per la uzado de Esp-o kiel nacie neŭtrala komuna lingvo. Sed ĝis nun la koncernaj registaroj ne konsentis pri tia solvo. Ĉiukaze oni povas vidi ke tiu forta konscio pri la neceso de lingva egaleco malebligas la uzadon de iu nacia lingvo kiel komuna internacia lingvo en la evoluintaj eŭropaj

landoj.

Ĝis nun mi ankoraŭ ne menciis pri la situacio en Azio. Azio ja estas la regiono en la mondo kiu nuntempe evoluas plej rapide en la ekonomia sfero k iuj opinias ke dum la venontaj jardekoj Azio fariĝos la centra regiono en la mondo de ekonomio k kulturo anstataŭ okcidenta Eŭropo k Usono. Kiel rezulto de tiu rapida ekonomia evoluo en Azio la internacia komunikado ankaŭ ege multiĝas inter Azio k landoj en aliaj regionoj, k inter la aziaj landoj mem. En Azio estas amaso da lingvoj, inter kiuj estas kelkaj grandaj lingvoj kiel la ĉina lingvo k la japana. Sed ĝis nun oni nur tre malmulte uzis aziajn lingvojn en internacia komunikado, t.e. dum la lastaj kelkdek jaroj. En komerco kun la okcidentaj landoj oni uzis plejparte la anglan lingvon k eĉ en komerco inter aziaj landoj la uzado de la angla lingvo estis tre kutima.

Sed de historia vidpunkto la uzado de la angla en komunikado inter aziaj landoj estas relative nova. Dum la lastaj kelkcent jaroj, aŭ eĉ mil jaroj, la ĉina lingvo estis plej multe uzata lingvo en internaciaj rilatoj en la orienta parto de Azio. Tio nur ŝanĝiĝis je la fino de la imperiestra periodo en Ĉinio kiam Ĉinio fariĝis malforta pro la invado de la okcidentaj imperismaj landoj k Japanio je la fino de la lasta jarcento. Samtempe Japanio fariĝis la plej potenca lando en Azio. Dum la ekonomia k milita ekspansio de Japanio en Azio en la unuaj jardekoj de ĉi tiu jarcento la japana lingvo fariĝis la plej multe uzata lingvo inter la landoj en la orienta k sudorienta parto de Azio kie la influoj de Japanio estis plej fortaj. Multaj de tiuj landoj ja fariĝis japanaj kolonioj antaŭ k dum la dua mondmilito kiam japanaj armeoj invadis ilin. Nur post la malvenko de Japanio multaj aziaj landoj akceptis la anglan lingvon kiel ilon de internacia komunikado. Tio estas parte ĉar post la milito la ekonomiaj k politikaj influoj de Usono fariĝis tre grandaj en multaj aziaj landoj; en multaj landoj en Orienta- k Sudorienta-Azio ja estis k daŭre estas usonaj militaj bazoj. Krome

kelkaj aziaj landoj estis dum longa tempo kolonioj de Anglujo. Sed la internacia uzado de la angla lingvo en Azio estas fakte tre maloportuna por Azianoj. Kiel kredeble plej multaj de vi, estimataj aŭskultantoj, jam spertis mem, la angla lingvo estas tre malfacila lingvo por Azianoj. Multaj de miaj japanaj konatoj lernis la anglan lingvon dum multaj jaroj, tamen tute ne kapablas paroli ĝin. Krome estas malagrabla, oni eĉ povus diri insulte, devigi antaŭajn koloniojn de Anglujo daŭre uzi la anglan lingvon kiam ili jam akiris sendependon. Ŝajnas al mi evidente ke la internacia uzado de la angla lingvo en Azio nur povas malgrandiĝi en la futuro. Grandaj nacioj kiel Ĉinoj k Japanoj nepre ne ŝatas uzi la anglan lingvon por fari komercajn aŭ ekonomiajn kontraktojn inter si, des malpli ili volus uzi la anglan por komunikado en la kultura sfero. Por ili uzi la anglan lingvon inter si estus preskaŭ konfesi ke la lingvo de Usono k Anglujo, t.e. de okcidentaj landoj, estas en iu senco pli bona ol la Ĉina lingvo aŭ la japana. Ĉinaj k japanaj kontraktantoj uzas pro tio preskaŭ ĉiam siajn naciajn lingvojn por interparoli kun la helpo de interpretistoj.

Nun kiam la ekonomia forto de aziaj landoj grandiĝas, la ekonomiaj k politikaj influoj de Usono iom post iom malfortiĝas k verŝajne daŭre malfortiĝos en Azio. Rezulte oni povas antaŭvidi pli grandan uzadon de aziaj lingvoj en inter-aziaj rilatoj. Jam estas rimarkinda la tendenco uzi la japanan lingvon en komerco k aliaj ekonomiaj interŝanĝoj inter Japanio k aliaj aziaj landoj. La uzado de la japana lingvo en komerco inter Japanio k Koreio, k inter Japanio k Taivano estas pli ofta ol la uzado de la angla. Tio estas parte pro historiaj kaŭzoj, Taivano k Koreio ja estis japanaj kolonioj dum iom longa tempo. Sed ankaŭ en rilatoj kun aliaj aziaj landoj japanaj kompanioj uzas la japanan lingvon pli k pli multe, eĉ en okcidentaj landoj pli k pli multaj homoj interesiĝas pri la japana lingvo pro la ekonomia sukceso de Japanio. Ĝis nun nur tre malmultaj eksterlandaj studentoj studas en Japanio, laŭ mia scio nun nur estas

dek kelk mil eksterlandaj studentoj en tuta Japanio, sed antaŭ unu aŭ du jaroj la japana registaro decidis pligrandigi la nombron de eksterlandaj studentoj en Japanio al proksimume 100,000 antaŭ la fino de la jarcento. La plej granda parto de eksterlandaj studentoj ĝis nun venis el aliaj aziaj landoj k tio verŝajne ne ŝanĝiĝos. Ŝajnas al mi, ke dum la venontaj kelkdek jaroj estas granda ebleco ke la japana lingvo anstataŭigos la anglan kiel la ĉefa inter-azia lingvo, aŭ almenaŭ kiel la ĉefa komerca lingvo de Orienta- k Sudorienta-Azio. Kredeble la Ĉina lingvo ankaŭ pli disvastiĝos en ĉi tiu mondparto en la venontaj jardekoj, sed la ekonomia forto de Ĉinio k ĝiaj komerco kun aliaj landoj ne estas tiel evoluintaj kiel tiuj de Japanio. Do supozeble la disvastiĝo de internacia uzado de la Ĉina lingvo ne estos tiel rapida kiel la disvastiĝo de la japana. Sed ĉu la uzado de la japana lingvo en inter-aziaj rilatoj povas solvi la lingvajn problemojn de Azio? Ĉu la uzado de la japana lingvo en internacia komunikado estas pli bona ol la uzado de la angla? Por Japanoj nepre jes, sed tute ne por aliaj nacioj. La japana estas same malfacila por aliaj Azianoj kiel la angla, k ĝi ne kunportus egalecon k facilecon al inter-azia komunikado. La japana lingvo ja estas la nacia lingvo de Japanio k ĝia uzado en inter-aziaj interŝanĝoj facile vekos malagrablajn memorojn pri la periodo kiam Japanoj koloniigis multajn aliajn aziajn landojn. Japanio ne devus repreni al si privilegiojn en rilatoj kun aliaj aziaj landoj per la disvastiĝo de la japana lingvo. Tio nur povas veki novajn konfliktojn kiam la naciaj konscioj de aliaj aziaj landoj fortiĝos. Ĉu la Ĉina lingvo do estus pli taŭga? Tute ne, multaj malgrandaj nacioj en Sudorienta-Azio timas ke grandega Ĉinio prenos al si mem suprecon en rilatoj kun aliaj landoj. Kaj kiel mi antaŭe argumentis la daŭra uzado de la angla lingvo en interazia komunikado estas maloportuna, malfacila, malegaleca solvo de la lingva problemo en Azio.

(daŭrigota)

北京の世界大会に参加して

児玉 広夫

今回の第71回世界大会には、道内から総勢15名が参加したが、そのうち終始行動を共にしたのは、三沢、星田の両氏と栗原御夫妻小淵嬢を除く10名。つまり、7月25日午前10時30分快晴に恵まれた千歳空港を元気に飛び立った木村、宮岸、坂下、児玉、北畠、藤平、砂野馬場の男女8名と、成田空港で合流した大和嬢と浜田氏である。どうしたはずみか私とその団長役を引受けるはめとなった。

成田空港待合ロビーでは、我々の緑の小旗を見て最初にエスペラントで話かけてきたのは、上海に住むという女性からである。今度は、アメリカから大会参加の一団と遭遇し、その中には、北畠嬢とサンフランシスコの夏期大学やバンクーバーの第69回大会で顔馴染みのひと数人がおり、彼女達は、抱擁によってしか再会の喜びを表しようが無いとばかりに... (御想像あれ!) さながら大会の感激的情景を見る思いであった。上海の女性とは二度と恵り合うことはなかったが、聞くところによると、彼女のフィアンセがアメリカ旅行団に加わっており、その出迎えであったようだ。

上海経由で北京空港へ到着したのは真夜中、従って宿泊先『友誼賓館』へ着いた頃は、翌日を一時間以上も過ぎたであろうか。それでも、坂下、藤平、砂野、馬場、大和の5人は朝7時には起床して朝食を済ませ、直ちにCe-kuesoの会場へ消えて行く。

私達は、この大会のために本年2月から毎週土曜日、さらには5月連休に強化合宿を行うなどにより、主として会話能力の向上を目指して特訓を行ってきたが、いよいよその成果を試すときは今日から始まるのだ。彼女達は、外国の同志たちに話かけられて立往生してはいまいか、という我々(木村、北畠、児玉)の愛いをよそに、元気に対応している。時折、jes! dankon!という弾んだ声が聞こえて来る。静かになって、ちょっと目を向けると、辞書を開きながら真剣な面持ちである。大丈夫だ!

振り返ってみると、食事時、中国のウエイトレスは、勝手に空いた食卓に着くことを許さず、一つのテーブルの席が全部埋まったところで、次のテーブルに着かせるやり方のためいきおい我々は別々にさせられる。その事が外国のエスペランチストとの対話を強いられる結果となり、会話実践の好機でもあるのだ。

7月27日、大会のハイライトは何と言っても開会式である。UEA会長の開会宣言の後、Esperoの合唱だ。その時、赤色と青色のロングドレスの女性、タキシードの男性、約70人のコーラスグループを乗せてオーケストラ、ボックスがせり上がった演出効果は抜群だ。続いてLKK代表、大会名誉総裁等の挨拶、大会祝賀演説と、一見月並と思われるが、50余国から2000人を超す参加者が一堂に会し、唯一の共通語エスペラントで一切の議事がとりすすめられることは、圧巻である。時に拍手が会場を押し、時に笑いごとよめき、話し手と聞き手とが混然一体となる様は、いいつきせぬ感激で一杯である。

さて、出発前Beverly J Laytonさんから最近出版された『リディア・ザメンホフの伝記』の著者、カリフォルニアのWendy M Hellerさんが、北京大会後、札幌へ立寄られると聞いていたので、彼女との出合いを望み、ホテルの隣室のアメリカ女性に尋ねたところ、意外や意外、その人が彼女だったのである。

大会期間中、毎夜Amuzaj Vesperojが催された。中国の伝統的なアクロバット、踊り、歌などのCina Vesperoを始め、コンサート、ユーゴスラビアの女性俳優のVerda Majoのモノログ、各国のエスペランチストが出演し歌や踊りを披露する国際芸術の夕べなど盛り沢山であった。

出発当初、風邪で体調をくずされた木村さん、大会3日あたりから回復されて元気に万里の長城を登りつめた時は嬉しかった。宮岸さんは、戦時中張家口の陸軍病院に勤務した経験から、当時と現在の中国事情を比較して感無量の御様子だった。小淵さんは、西ドイツの文通の友とRendevua Tabeloを介して劇的な対面を果たすことができた。彼と文通を始めた頃、私も若干のお手伝いをしたことから、私もお会いしビールを飲み交わしたが、想像どおりの立派な方であった。

以上、思いつくままペンを走らせたが、大会参加の思い出、印象は書きつくせない。それ等は、すべてエスペランチストならではの味わうことのできないことばかり、改めて"知合った同志は、皆我が家族なり"の思いを深め、我が心に大事に秘めて行きたいと考える。

終わりに、北京動物園やショッピングの案内などで大変お世話になった中国の女性エスペランチスト達に心から御礼申上げたい。

EL LA HOKKAJDO GAZETARO

★《北海道新聞》8月11日1面「卓上四季」欄に
“国際的に通用する政治家というのが中曽根人
気の秘密だ。英語でレーガン、サッチャーさんに
話しかけ、フランス語に翻訳した俳句をミッテラ
ン氏に進呈するなど、歴代首相にはなかった振る
舞が多く日本人の気持をくすぐった。▼だが、
中曽根さんが語学の達人だとのうわさは、ついぞ
聞かない。相手に近親感を伝えるのは上手かもし
れないが、それだけでは複雑かつ微妙な外交問題
を解決するのは難しい。まして相手の言葉の土俵
に乗った交渉では、こちらが一方的に不利だ。▼
日本が欧米諸国との経済摩擦で追い込まれている
のは、多分にこの言葉のハンディキャップが影響
している。練達の外交官でも他国語で対等に太刀
打ちするのは至難の業だからだ。▼同じ条件で話
し合える言葉はないか、と作られたのが国際語
「エスペラント」である▼ポーランドのユダヤ人
眼科医ザメンホフが、この言葉を発表してから来
年で百年になる。世界のエスペラント運動が久し
ぶりに活気づいているのは、このためである。先
月末から今月初めにかけて中国の北京で開かれた
世界大会には、約50カ国、2500人が出席し、
人類の相互理解と発展を誓い合った▼日本からも
300人が参加した。国際会議で一般に使われて
いる英語でなく、人工語で話し合っても理解の妨
げにはならなかった。むしろ真の国際平等を体得
して感動したという▼民族の心の微妙なヒダはし
ょせんその民族語を話す人たちにしか分からない。
英語の役割が巨大なだけに、非英語圏の声を中立
的な国際語を通して知る運動も必要だろう。”

★《北海道新聞》8月16日「声」欄に
「平和のシンボルエスペラント」と題し宮岸忠孝
氏が“このたび、北京市でのエスペラント世界大
会に参加するため中国を訪れた。44年前戦争で
兵隊として滞留した苦い過去を忘れることはでき
ない。しかし、今回は平和の使者として過去をわ
びる思いも秘めて参加した。8月は終戦記念、平
和を再確認する月でもある。平和は反核、護憲等
の日常的な運動から、人類の相互理解の手段とし
ての言語を重視し、視野を広げたいものである。”
★《読売新聞》9月4日「北の文化」欄と
★《朝日新聞》9月5日「さっぽろ圏プログラム」
欄に「第50回北海道エスペラント大会記念講演
会」開催についての案内

来訪者

- ★《梅田 善美氏》—UEA副会長—
3月22日に札幌市クリスチャンセンターで開
講中の北京大会参加準備学習会にてUK参加の心
得等を指導、18時からニューフロンティアにて
歓迎懇談会を開催する。
- ★《L. Mc GILL 女史》—ニュージランド—
4月26日に人形劇団「夕やけ」の公演で夫君
と共に来札、“こぐま座”で今年の第70回アウ
グスブルグ世界大会とヨーロッパ各地でエスペラ
ントによる人形劇を上演し、その時の出し物をス
ライドにより報告し説明した。その後SESの会
員と夕食を共にした。
- ★《三石 清氏》—名古屋市—
6月21日にSES例会に出席し、話題諸般に
及ぶ。
- ★《Gunther HELLER氏》—西独—
★《Oriver WALZ氏》—西独—
7月9日に大阪の f-ino 佐久田三重子が同伴
で北京の71a UKに参加の途次来札された。
- ★《Wendy HELLER 女史》—米国—
★《D-ro KIM Yung-myung》—韓国—
8月9日北京の71a UKに参加後来札され和
風料亭“風花”にてSESの有志により歓迎懇談
- ★《Uūsink-Nagata 夫妻》—和蘭—
8月13日北京の71a UKに参加後来札され
レストラン ニューフロンティアにてSES有志
により歓迎懇談会を開催旧交をあたためた。

会員消息

- ★《函館市 吉田 栄氏》
1923年(大正12年)以来、函館エスペラン
ト界の発展に尽力してこられ、北海道エス運動史
上、忘れることのできない方であるが、近年健康
充分ならずとか、毎年の道大会には必ず参加して
おられたが今年の第50回大会に顔が見えず残念。
健康の回復を祈念します。
- ★《室蘭市 平田岩雄氏》
1933年(昭和8年)エス語独習、爾来室蘭
エス界の重鎮として多くエスペランティストの育成
に努力してこられた方であるが、今夏以来、病の
ため入院中の由、今年の年賀状で道大会には是非
出席したいとのことで期待していたが残念、一日
も早く全快されるよう祈ります。